

Ora Ĵurnalo

Numero 17, Aprilo 2019



Al la tuta mondo:

*Bonvenon al la **verda** Gotenburgo!*

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Enhavo	2	Fantoma metrostacio en la komunumo	
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Sundbyberg	15
Espe-Porko meditas	3	Trajn-anedkoto	16
Printempo en Gotenburgo	3	Trezoro por trajnamantoj	16
Helfrid Karlsson eksiĝis de sia multjara membrego de la esperanto-estraro de Gotenburgo	4	”Bergenbanan”	20
La ”prepara 90-jara celebros” ĉe Britta Rehm, nun nur 89-jara	5	Signalsekureco	21
Paskajn salutojn de Lucyna el Gdansko	5	Danĝera ejo!	22
De Paulina en Gdansko	6	Malnova kaj nova libromemoroj	23
Esperanto-Sabato 6 aprilo HELENA JOHANSSON – pri arkeologio kaj loknomoj ...	7	Brobyggarna – La pontistoj.....	24
Kelkaj provincoj kaj ŝtonoj en Gotio	9	Jan Guillou.....	24
Provincoj kaj bestoj en Svedio	10	Kurso por fervojistoj, trovita de Birgitta Anevik	25
La fringo.....	11	Tidelipom’	26
Paskajn gratulojn el 2760-jara Samarkando!	11	Res med Esperanto i bagaget	26
La miopa fringo, Knut – ”Den narsynte bofinken Knut”	12	Alexander Keiller – la fondinta patro de ”Götaverken”	27
Nun sekvas multaj paĝoj pri fervojoj!	13	La kolerega Keiller.....	27
La stacidomo en Gotenburgo.....	13	Esperantolibroj, poseditaj de la estona Anton Reinhold Kapper por la biblioteko de Stannum.....	29
Ploranta knabino en la fervoja stacidomo de Gotenburgo	13	Artikolo de Rein Kapper en MALGRANDA REVUO 1944.....	30
LOKOMOTIVO – verso por infanoj de la pola verkisto Julian Tuwim.....	14	Propono por post la ”breksiĝo”	33
		Att skicka till alla svenska EU- parlamentariker?	34

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Ora Klubo, subtena klubo de la esperantolibrejo en Stannum, Östadsvägen 68. La eldonfrekvenco estas neregula.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingegerd.granat@telia.com. Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!



Espe-Porko meditas



- ❖ Trajnoj, trajnoj, trajnoj troviĝas en ĉi tiu numero. Ne kun vaporlokomotivoj kiel sur la bildo – sed elektraj. Bone por la medio!
- ❖ Birgitta Anevik trovis interesan kurson por fervojistoj. Uzu ĝin en viaj esperantaj kursoj antaŭ ol vi libertempos, uzante la trajnon.
- ❖ Sed kiuj volus funkciigi la SEF-trajnon? Ankoraŭ mankas estraranoj. Pensu tiele: "Ne demandu kion SEF povus fari por vi! Pensu: Kion mi povus fari por SEF kaj por la tuta lando?"
- ❖ La elekta komitato konsistas el Anita Dagmarsdotter, Soile Lingman kaj Siv Burell. Telefonu al ili kaj diru: "Mi pretas labori por SEF!"
- ❖ En la jarkunveno, 2 marto, Helfrid Karlsson forlasis la estraron. Ni dankis ŝin dum Esperanto-Sabato, la 6an de aprilo, pro multaj laborjaroj por la Gotenburga klubo. Inga Johansson nun estas la nova estrarano. Koran bonvenon!



- ❖ Britta Rehm ne volis atendi ĝis la venonta jaro por celebri sian 90an naskiĝtagon. Do, ni faris tion la 9an de marto 2019, kiam Britta fariĝis 89-jara. Bona ideo!
- ❖ Novaj kunlaborantoj en ĉi tiu numero estas Ingrid Vallin (Provincoj kaj bestoj) kaj Jüri Baumann (pri sia avo la estono Rein Kapper).
- ❖ Dum la Esperanto-Sabato, 10 aprilo, Helena Johansson prelegis pri arkeologio kaj loknomoj. Ŝi vere sorĉis nin!
- ❖ La fringo estas la aprila birdo de Ora Ĵurnalo.
- ❖ Pasko malfruas ĉi tiun jaron. La memorregulo estas ke la paska dimanĉo okazas la unuan dimanĉon post la unua plenluno post la tagnoktegallo.
- ❖ Kiel logi junajn esperantistojn al ni? Paulina trovis multajn gejunulojn en Lodzo.
- ❖ Okaze de "Brexit" ni skribos al la EU-parlamentanoj pri la avantaĝoj de Esperanto.

Printempo en Gotenburgo

Bildo de Göteborgs-Posten.

Ĉiun printempon la boato Renström (Pura fluo) purigas la kanalojn. Por inaŭguri la "purigan tempon" oni metis 1 200 plastikajn anasidojn en la kanalon ĉe Brunnsparken.





Pli fore la boato kolektis ilin. Poste oni ĉi tiun jaron kolektis 10 tunojn da rubaĵo el la kanaloj. I.a. oni trovis tutan eksteran kafejon kun tabloj kaj seĝoj, sed ĉefe la rubaĵo konsistas el cigaredstumpoj.

En la parko ĉe la katedralo mi fotis florantan paduson. La temperaturo altis je 15 gradoj, sed hodiaŭ matene (11 aprilo) denove estis sub la nulo. /Siv

Helfrid Karlsson ekŝiĝis de sia multjara membreco de la esperanto-estraro de Gotenburgo

Koran dankon al Helfrid Karlsson, kiu dum multaj jaroj estis estrarano de la Esperanto-Societo de Gotenburgo. Ŝi estis kasisto dum kelkaj jaroj, deĵoris dum la Libro-Foiro kaj gastigis nin en sia hejmo je la ĉiujara kristnaska festo!

Ni esperas ke vi daŭre vizitu nin, Helfrid!

Kaj estu bonvena al la estraro Inga Johansson, kiu multfoje estis adjungita al la estraro, sed nun vere estas estrarano! /Siv



La "prepara 90-jara celebros" ĉe Britta Rehm, nun nur 89-jara

Kial atendi ĝis la 90-a naskiĝtago, kiam oni volas celebri nun! La 9-an de aprilo Britta invitis al "malferma hejmo" en Skäpplandsgatan. Jen Aino, mi kaj Andreas en la apartamento de Britta. Britta ankoraŭ havas la saman rapidspitecon kiel antaŭe kaj ni multe ridis. Lennart, kiu prizorgas ŝian ekonomion kaj aliaj praktikaĵoj, regalis nin per kafo kaj kremtorto. La bukado antaŭ Britta estas de la Esperanto-Societo de Gotenburgo.

Antaŭ ol ni, tri virinoj de iu societo estis venintaj, kaj dum nia restado envenis najbarino. Post ni venis aliaj gastoj. Eĉ se la memoro de Britta malboniĝis, ŝi vere ĝuis sian naskiĝtagon.



Britta estis sekretario, kasisto kaj ĉiam inspira membro de la Esperanto-Societo de Gotenburgo. Ni dankas pro gaja kunveno! /Aino, Andreas kaj Siv

Paskajn salutojn de Lucyna el Gdansko

Gajan kaj feliĉan Paskfeston ni deziras al vi kaj via familio kaj al ĉiuj konatuloj.

Lucyna kaj Marek



De Paulina en Gdansko



Renkonto kun multaj gejunuloj en Lodzo kaj invito al Esperanto sur la strando.

Ŝi skribis la 5an de aprilo:

Mi nur volis skribi al vi pri nia lasta esperanta renkontiĝo kun pola junularo. Tiu okazis en Lodzo – granda pola urbo en la centro de Pollando. Mi devas konfesi, ke mi neniam estis en Lodzo por vizitado, nur trapasis ĝin. La urbo estas tute alia ol Gdańsk. Unue ĝi estas pli juna kaj due – ĝi havas tute alian karakteron. En preskaŭ la tuta dudeka jarcento tiu estis la urbo de teksaĵaj fabrikoj kaj interese estas, ke la fabrikoj estis en la urbocentro. Nun neniu fabriko laboras kaj en tiuj forlasitaj konstruaĵoj oni faras loĝejojn, vendejojn, restoraciojn...

Krom la urbo, vere valora estis por mi la renkontiĝo kun junaj polaj esperantistoj. Ili agas tute alie ol ni en nia klubo. **Ili renkontiĝas en la reto aŭ vojaĝas kune kaj organizas multe da eventoj.**

Tre interesa estas por mi la ideo konatiĝi kun "duolingo"-lernantoj. Ĉu vi scias pri "duolingo" – la interreta senpaga maniero

por lerni diversajn lingvojn. Oni povas fari duolingo-eventon, kiu estos reklamita en la aplikaĵo. PEJ (Pola Esperanta Junularo) provis tiun eblecon en Varsovio kaj trovis kelkajn ne konatajn esperantistojn.

Nun kiel nova ĉefino de nia malgranda klubo, mi ankaŭ komencis iomete ĉagreni **kiel trovi novajn esperantistojn**. Homoj ne volas ekkoni la bonegan esperantan mondon.



Lastatempe ni komencis labori pri ĉijara "Esperanto sur la Strando". Estus bonege se ankoraŭ Gotenburganoj kaj aliaj gajaj Svedoj povus veni. Sed pri tio mi skribos poste al ĉiuj, kies adresojn mi havas.

Mi printempe salutas vin el trajno. Mi vojaĝas al miaj gepatroj por pasigi la semajnfinojn kun ili.

Brakumojn,
Paulina

Esperanto-Sabato 6 aprilo

HELENA JOHANSSON – pri arkeologio kaj loknomoj



Ord om ortnamn och arkeologi – Vortoj pri loknomoj kaj arkeologio

- | | |
|----------------------------------|--|
| • Ortnamn | Loknomoj |
| • By, ort, stad | Vilaĝo, loko, urbo |
| • Naturnamn – bestämd form | Naturnomoj – difinita formo |
| • Mänskliga spår | Homaj spuroj |
| • Vattenvägar – enklast | Akvo-vojoj – plej simple |
| • Sommar- och vintervägar | Someraj kaj vintraj vojoj |
| • Lövträd | Foliarboj |
| • Sten-, brons-, järnålder | La ŝtonepoko, la bronzepoko, la ferepoko |
| • och medeltid | kaj la mezepoko |
| • Muntligt överförda berättelser | Buŝe transigitaj rakontoj |
| • Gravar | Tomboj |
| • Bosättningar | Ekloĝoj |
| • Odlingsspår | Spuroj de kultivado |
| • Förändringar över tid | Ŝanĝoj trans la templimoj |
| • Dialektspår – isländska | Dialektspuroj – la islanda |
| • Gränsmarkeringar | Limmarkoj |
| • Allmänna skogar | Komunaj arbaroj |
| • och betesmarker – lantmäteri | kaj paŝtejoj – termezurado |

Helena Johansson naskiĝis sur pratombaro – almenaŭ proksime al pratombaro – en Södra Säm, Ulricehamn, Vestrogotio. Tial ŝia intereso pri malnovaj aĵoj kaj la prahomaro.

Lingvoj estas ŝia hobbio – kaj estis ŝia profesio. Dum 40 jaroj ŝi havis postenon kiel lingvo-

instruiston ĉe KomVux, Gotenburgo. Sed nun ŝi ĉefe okupiĝas pri arkeologio kaj tralegas multajn malnovajn dokumentojn.

Unue Helena montris du ŝtonojn, aĝaj je ĉirkaŭ 400–65 milionoj jaroj. Unu enhavas



spuron de Amonito, speco de sepio, marbesteto kiu nun ne plu ekzistas.

La alia fosilio estas Gruphea "The Devils Toe-nail" – la piedfingra ungo de la diablo.

Kompare kun la prabestoj la spuroj de homoj estas multe pli novaj – "nur" ĉirkaŭ 10–12 000 jarojn ili havas. La dukilometra dika glacio forprenis la plimulton da spuroj.

Kial homoj enmigris al nia norda malvarma lando? Pro nutraĵo! La bestoj estis la unuaj enmigrintoj kaj la ĉasistoj sekvis ilin. Ili iris laŭlonge de marbordoj, lagoj kaj riveroj. Estis bezono informi la kunulojn pri lokoj, do oni bezonis lokvortojn.

La plejparto de loknomoj aludas la naturon kaj havas difinitan formon, ekz. la riveroj: Lagan, Nissan, Åtran kaj Viskan; lagoj kiel Vänern, Vättern kaj Sävelången; terareoj kiel Heden kaj Näset. Kelkaj finiĝas ne per -n sed per -a, ekz. Kortedala kaj Landala, ĉar en partoj de la lando ankaŭ -a estis marko de la difinita formo.

La klimato estis sufiĉe varma dum la bronzepoko kaj ĉefe kreskis foliarboj.

Dum la 17a jarcento termezurado komenciĝis. Okazis ke la termezuristoj



miskomprenis lokajn nomojn, ekz. Kōttkulla, kiu ne estas ligita al kött = viando, sed "tjötet kulle", kiu signifas altaĵon kun dure pakita tero aŭ sablo, kiu ne disfalas kiam oni fosas, sed havos vertikalajn flankojn.



Antaŭ 5–6 000 jaroj nova popolgrupo enmigris – kaj ekestis novaj ideoj.

Tomboj estas la plej oftaj eltrovoj, ofte alte sur montetoj. La tiamaj mortintaj ĉefoj povus de supre "rigardi" la loĝantaron. Spuroj de loĝejoj situas pli malalte. Oni povas distingi kultivŝtonaron de tombŝtonoj. Ĉiuj tombŝtonoj havas preskaŭ la saman grandecon por honorigi la mortinton. Limo por la kultivado konsistas el ŝtonoj de diversaj grandecoj.

Ekis nomoj de laboro – ekz. Stretered. – "Tie mi estis, kaj mi devis multe strebi".

La loknomo "hejmo" troviĝas en diversaj formoj: Södra Säm unue estis Sjöhem (hejmo ĉe la lago).

La finaĵo -um (= hejmo) troviĝas ekz. en Bergum, Lerum, Stannum, Tanum.

Ekde la bronzepoko venis dinomoj. Komercaj kontaktoj rezultis ne nur en novaj varoj, sed ankaŭ en novaj ideoj. La dio Tor donis nomon al Torslanda, Torshälla, Torsås; la dio Oden – Odensgatan; la dio Frö – Frölunda; la diino Frigga – Friggagatan; la edzino de la dio Tor – Siv/Sif ekz. Sifhälla, kiu nun nomiĝas Säfte.

Helena Johansson nun skribas eseon pri arkeologio kaj loknomoj. Ni deziras al ŝi SUKCESON!

La Esperanto-Sabato daŭriĝis per du konversaciaj kursoj. 14 personoj partoprenis. /Siv

Kelkaj provincoj kaj ŝtonoj en Gotio

Ekde 1989 ĉiu provinco en Svedio estas simboligita per rokaĵo, kiu estas karakteriza por ĝi. La ŝtonoj estas elektitaj de SGU (la Sveda Geologia Esplorado).

Bohuslando: Bohuslanda granito

Bohusgranit. Foto: Anders Damberg.



Ĉefe la bohuslanda granito havas la samajn elementojn kiel gnejso. Ĝi aspektas malsame – la koloroj povas esti ruĝgriza ĝis preskaŭ blueta. La grandeco de la ŝtoneroj varias kaj la diversaj variantoj havas lokajn nomojn. Antaŭe oni uzis la ŝtonojn kiel stratŝtonojn kaj eĉ eksportis ilin, sed kiam la asfalto fariĝis kutima, oni pli ofte uzas la graniton por fasadan kovraĵon. La granito enhavas uranion kaj torion kaj povus esti uzata por produkti energion

Skanio – siliko



Flinta. Foto: Anders Damberg.

La splitoj de siliko estas akraj kiel razklingoj. Niaj prahomoj uzis ilin kiel ilojn – tranĉilojn, sagpintojn k.t.p. Tamen ili rapide estis uzfrotitaj.

Alia uzo de siliko estis starti fajron per ĝi. Oni frotas du ŝtonojn kontraŭ unu la alia kaj oni ricevas fajrerojn.

Smolando: Ruĝa Växjö-granito



Röd Växjögranit. Foto: Anders Damberg.

La Smolanda provinca ŝtono, la ruĝa Växjögranito estas bela varianto de la Smolanda granito. Ĝi povas esti griza aŭ ruĝa – aŭ miksita. Oni ekspluatas ĝin en la areo ĉirkaŭ Växjö por domkonstruo.

Vastra Gotio: plataĵa diabazo



Platådiabas. Foto: Anders Damberg.

Ĉi tiu malhela rokaĵo kovras la "kapojn" de la Vestrogotiaj montoj, protektante la sube kuŝantajn molajn rokaĵojn. Kiam oni uzas la plataĵan diabazon por tomboŝtonoj oni nomas ĝin nigra granito.

Provincoj kaj bestoj en Svedio

Ĉiu provinco havas sian propran beston, kiu signifas ion, kion oni rigardas tipa por la provinco.

Jen listo farita de Ingrid Vallin:

Provinco , svede	Tipa besto, svede	Tipa besto, esperante	Provinco , esperante
Blekinge	ekoxe	lukano	Blekingo
Bohuslän	knubbsäl	foko	Bohuslando
Dalarna	Berguv	gufo	Dalekarlio
Dalsland	korp	korvo	Dalio
Gotland	igelkott	erinaco	Gotlando
Gästrikland	tjäder	urogalo	Gestricio
Halland	lax	salmo	Halando
Helsingland	lo	linko	Helsinglando
Härjedalen	björn	urso	Herjedalio
Jämtland	älg	alko	Jemtlando
Lappland	fjällräv	izatiso	Laplando
Medelpad	skogshare	leporo	Medelpado
Norrbottn	lavskrika	muta garolo	Norda Botnio
Närke	hasselmus	muskardeno	Neriko
Skåne	kronhjort	grandcervo	Skanio
Småland	utter	lutio	Smolando
Södermanland	fiskgjuse	fiŝaglo	Sudermanio
Uppland	havsörn	(blankvosta) maraglo	Uplando
Värmland	varg	lupo	Vermlando
Västerbotten	storspov	numenio	Okcidenta Botnio
Västergötland	trana	gruo	Vestrogotio
Västmanland	rådjur	kapreolo	Vestmanio
Ångermanland	bäver	kastoro	Angermanlando
Öland	näktergal	najtingalo	Oelando, Elando
Östergötland	knölsvan	muta cigno	Ostrogotio

Lavskrika – muta garolo



Ekoxe – lukano



Hasselmus – muskardeno





La fringo

La fringo troviĝas en la tuta Svedio kaj estas kune kun la fitiso la plej ofta birdo. Ĝi havis idojn en parkoj, ĝardenoj kaj en ĉiaj arbaroj se la arbaroj ne estas tro densaj.

La fringoj estas migrobirdoj kiuj venas en printempo kun bonaj kantoj kiuj markas sian teritorion. Dum septembro – oktobro ĝi revenas en grandaj aroj al pli varmaj latitudoj de okcidentaj landoj en Eŭropo.

Sur la manĝokarto de la birdo estas semoj kaj insektoj. La fringo konstruas la neston el muskoj, lanugoj kaj plumoj. Ekstere ĝi vestas la neston kun likenoj de nestarbo kaj pro tio estas la nesto bone kamuflita.

La longeco de la birdo estas 14–16 centimetroj kaj kun multkoloraj bonaj farboj. La virbirdo estas rustkolora kun griza kapo kaj nuko. Ĝi havas blankajn striojn sur la nigraj flugiloj. La birdino havas la pli grizan plumaron.

Se la fringo estas miopa aŭ ne, estas malfacile scii sed la fama aktorino Eva Rydberg de

Svedio kantis pri la kompatinda fringo Knut, kiu estos fotita de Nils Linnman kaj liaj famaj televidaj grupanoj.

Eniru en la komputilan ligilon kaj aŭdu!

<https://www.youtube.com/watch?v=D0QZhrCPboo>

/Ingegerd

Paskajn gratulojn el 2760-jara Samarkando!

Samarkandiana 18 aprilo



Karaj geamikoj,

Ĉi-jara Pasko alportu al vi kaj via familio pacon, fortikan sanon, harmonion kaj amon!

Tiu ĉi festo inspiru vin al novaj esperoj je pli bona mondo!

Estu via vivo plena je benoj!

Feliĉan Paskon 2019,

Anatoli & familio

La miopa fringo, Knut – ”Den närsynte bofinken Knut”

Revua kanzono de Hagge Geigert (teksto). Melodio ”Det var dans bort i vägen”.

<https://www.youtube.com/watch?v=4Cd84vIQaAs>

1954 Nils Linnman kaj Nils Dahlbäck startis la televidan naturprogramon ”Naturen och vi”.

Estas dolĉa arbaro, matene en printempo,
ĉie flustras, flustraĉas, kveradas ĉe veproj,
sunradioj nun ludas ”kuku”.

Tuf-alaŭdo kaj turdo, kaj tringo kaj sturno
Ĉe la lago nun gapas la ploto al leporo
kaj al fringo miopa, ho Knut.

Nun aŭdiĝas infera ektondr’ en arbaro
Televido abrupte nun estas ĉi tie
por forpreni la pacon de bestar’.

Jen Linnman kaj Dahlbäck kaj lampoj kaj ŝnuroj,
kaj kelkaj fotistoj fotilojn nun ŝargas
kontraŭ fringo miopa, ho Knut.

Tra arbedoj penetras musteloj, putoroj
dum leporoj, sciuroj pro timo nun kuras
dum la takta krieg’ de filmĉef’.

Jen la sekretari’ kun tondilo kaj klapo
kaj Linnman nun venas kun sia melhundo
kontraŭ fringo miopa, ho Knut.

Ĝuste tiam la gufo nun vokas en arbar’:
”Tuj forkuru ĉar TV ja restas en natur’!
Kuru for ĝis finiĝos la film’!”

Tie fuĝas alaŭdoj kaj sturnoj, leporoj
al arbaro sukcese savantan sian haŭton
krom la fringo miopa, ho Knut.

Tiu sola oldul’, iomete rezignita
kaj kutime hontigita, oferita kaj fotita
post debuto en vivo, ho, ho.

”Auu”...Linnman kaj Dahlbäck estos ĝojaj kaj
saĝaj
ĉar sekvantan sabaton denove ili montros
la fringon miopan, ho Knut.



Det är ljuvligt i skogen en morgon om våren!
När det tisslar och tasslar och kuttrar i snåren
och små solstrålar leker tittut!

Det är tofslärkan, trasten och snäppan och staren
och vid sjökanten stirrar en mörkt rakt på haren
å den närsynta bofinken Knut.

Plötsligt hörs det ett helvetes dån omkring
djuren.

Det är TV som plötsligt ska ut i naturen
för att göra på djurfriden slut.

Där är Linnman å Dahlbäck och lampor och
sladdar
och 12 fotografer som kamrorna laddar
mot den närsynta bofinken Knut.

Genom buskarna vråker sig vesslor och illrar;
medan harar och ekorrar skräckslagna kilar
under filmbossens taktfasta tjut

Där är killen med klappan å skriptan å saxen
å snart kommer Linnman att släppa lös taxen
mot den närsynta bofinken Knut.

Just då ropar en uv som en vaktpost i skogen
skynda bort medan TV är kvar i naturen.
Spring åt skogen tills filmen är slut. ahhh...

Där flyr lärkor och starar och trastar och harar
och alla till skogen och livhanken klarar
utom närsynta bofinken Knut

Han är ensam och gammal och rätt resignerad
han är van att bli offrad och fotograferad
sen den dagen han gjorde debut auu..

Auuu... Linnman å Dahlbäck blir glada och visa
och följande lördag de åter kan visa
den närsynta bofinken Knut.

Nun sekvas multaj paĝoj pri fervojoj!



La stacidomo en Gotenburgo

Ek de la jaro 1856, la Gotenburganoj prenas la trajnon el tiu loko ĉe "Drottningtorget" kie la stacidomo staras hodiaŭ. Estis la arkitekto Adolf Wilhelm Edelsvärd (1824–1919) kiu desegnis tiun fantazian kaj nobloriginan konstruaĵon kiu daŭre akiras bonan reputacion pro ĝia funkcio.

Ni devas esti ĝojaj pro ke la flugilornamita horloĝo ne batis sian lastan baton je la bela stacidomo.

Jam en la 1940-aj jaroj la regantoj en Gotenburgo volis anstataŭigi la belan stacidomon kun kvinetaĝa, funkciisma domo. Se tio supozeble okazus, kontraŭ ĉia atendo efektiviĝus, oni ree devus elpreni "Blomster-Jöran", ĉar li servis nome kiel punpilorio ekstere la olda, provinca arestejo je la loko kie la stacidomo situas hodiaŭ.

Sed, kiu scias, li eble revenos malgraŭ, kun pensoj pri trajnmalfruiĝoj kaj malbonaj subtenadoj... ni povos ekvidi! /Ingegerd

Ploranta knabino en la fervoja stacidomo de Gotenburgo



Foto: Jon Peter Dahlquist

Kial ŝi ploras? Bv. sendi al Ora Ĵurnalo vian rakonton pri la knabino! Limdato estas la 10an de majo. La angla artistino Laura Ford, naskita en Wales en 1961, faris skulptaĵojn kiuj ofte estas ruzaj – severaj kaj humuraj samtempe. La materialo estas bronzo kaj ĝi altas je 1 metro. En la jaro 2009 ĝi estis metita en la stacidomo de Gotenburgo. Ĉu la knabino vere ploras aŭ ĉu ŝi kaŝludas?

La hejmpaĝo de la artistino estas:

www.lauraford.net /Siv



LOKOMOTIVO – verso por infanoj de la pola verkisto Julian Tuwim

Esperantigis Aleksandra Ivanov. Trovis ĝin interrete: Inga Johansson.


Staras sur reloj lokomotivo,
Fluas la ŝvito sur la deklivo
Grasa olivo!
Spiras kaj ronkas, staras senmova.
Ardon de l' granda ventro disblovas:
Oh, la varmego!
Uh, la varmego!
Ah, la varmego!
Apenaŭ vivas, apenaŭ spiras
Sed ĉiam novan karbon entiras
Ĝin sekvas vagonoj el la metalo
Grandaj kaj pezaj, el fero, ŝtalo
En ĉi-vagonoj bruo kaj movo,
Ĉeval en unu, en dua bovo
En tria nure dikuloj sidas
Manĝas kolbasojn, kaj gaje ridas.
En kvara estas multajn bananoj,
En kvina staras dek fortepianoj,
Ho, kiel granda, granda kanono!
Staras en tiu sesa vagono!
Sepa enhavas meblojn. En oka
Urs', elefanto, ĝirafoj, foko.
En naŭa estas dikaj porketoj.
En deka kestoj, kofroj, paketoj.
Vagonojn kvardek maŝino trenas
Demando- kion entenas?
Sed kvankam venus eĉ mil atletoj
Kaj ĉiu manĝus eĉ mil kotletojn
Kaj ĉiu multe tiri ĝin penus,
Ili tutcerte ĝin ne ektrenus.
Nun ja – Puf!
Nun ja – Bum!
apor' –Uf!
Radoj – Grum!

kiel testudo la trajno sin movas
Staras sur reloj lokomotivo,
Fluas la ŝvito sur la deklivo
Grasa olivo!
Spiras kaj ronkas, staras senmova.
Ardon de l' granda ventro disblovas:
Oh, la varmego!
Uh, la varmego!
Ah, la varmego!
Apenaŭ vivas, apenaŭ spiras
Sed ĉiam novan karbon entiras
Ĝin sekvas vagonoj el la metalo
Grandaj kaj pezaj, el fero, ŝtalo
En ĉi-vagonoj bruo kaj movo,
Ĉeval en unu, en dua bovo
En tria nure dikuloj sidas
Manĝas kolbasojn, kaj gaje ridas.
En kvara estas multajn bananoj,
En kvina staras dek fortepianoj,
Ho, kiel granda, granda kanono!
Staras en tiu sesa vagono!
Sepa enhavas meblojn. En oka
Urs', elefanto, ĝirafoj, foko.
En naŭa estas dikaj porketoj.
En deka kestoj, kofroj, paketoj.
Vagonojn kvardek maŝino trenas
Demando- kion entenas?
Sed kvankam venus eĉ mil atletoj
Kaj ĉiu manĝus eĉ mil kotletojn
Kaj ĉiu multe tiri ĝin penus,
Ili tutcerte ĝin ne ektrenus.
Nun ja – Puf!
Nun ja – Bum!
Vapor' –Uf!

Radoj – Grum!
kiel testudo la trajno sin movas,
Sur reloj dormeme veturi ĝi provas,
Moviĝas maŝino kaj tiras, kaj penas
ruligas la radojn, vagonojn ĝi trenas,
Kaj kuras rapide, kaj muĝas, kaj fumas,
Kaj hurlas obtuze kaj frapas kaj zumas
Do kien? Do kien? Tra l' pont,
Sur reloj, sur reloj, sur reloj, ĉe l' mont'.
Laŭ kampoj, arbaroj, malluma tunel'.
Ĝi kuras rapide al fora la cel'
Por veni ĝustatempe ĝi kuras, kaj fakte
Ĝi frapas kaj grincas laŭ takte, laŭ takte...
Mole, facile, ruliĝas ĝi for,

Ludpilkon similas maŝ' kaj vapor'.
Ja peza, bruega ĉi monstro el ŝtalo
Similas al eta ludil' el metalo
Per puŝo kaj skuo kaŭziĝas ĉi port',
Ĉu pelas aŭ tiras ĝin iu per fort'?
Ĝi grincas kaj frapas kaj kuras for, for!
Kaj spiras kaj siblas kaj fajfas vapor'!
Vaporo varmega maŝinon ĉi movas
Kaj radoj veturi, ruligi sin povas.
Kaj radoj turniĝas kaj grincas kaj kuras,
Vapor' radojn puŝas kaj trajno veturas.
Ĝi spiras kaj hastas, ĝustatempe, ekzakte,
Laŭtakte, laŭtakte, laŭtakte!

Fantoma metrostacio en la komunumo Sundbyberg



La plej konata ekzemplo pri fantoma stacio en Svedio estas tiu de Kymlinge. La metroaj trajnoj trapasas la stacion, sed neniam haltas. Temas pri la "blua linio", ligita al Stokholmo. Oni planis areon en arbaro, ĉefe por ŝtataj administracioj kaj loĝdomoj. Oni opiniis, ke estas tro multaj el ili ene en Stokholmo. Tamen oni lokis kelkajn administraciojn al aliaj urboj dise en Svedio kaj la areo neniam ricevis loĝatecon. Nur la haltejon oni konstruis.

Mito diras, ke se la trajno haltus, nur mortintoj elirus.

Sub Rannebergen en la norda parto de Gotenburgo oni planis subteran tramstacion. Parto de tunelo estis konstruita, sed neniu tramo trafikis la lokon kun duone finkonstruita stacidomo, kaj antaŭ longe la tunelo estas barita. /Siv

Trajn-anedkoto

Maljunulo en la trajno por iri hejmen post vizito en la urbo, ne rimarkinte ke li prenis la malĝustan trajnon, diras al sia kunveturanto:

- Kaj kien vi estas survoje?
- Mi veturas al Hallsberg.
- Ho, kiel la evoluo progresas. Jen ni sidas en la sama vagonaro kaj iras en malsamaj direktoj!

Trezoro por trajnamantoj

Malantaŭ vilao en la gotenburga regiono ni trovis domon en la skalo 1:8. Estis la infanaĝa domo de Lasse kaj liaj fratinoj. La domo troviĝis proksime al fervojtrakoj.




Jen Hans, la kreanto, ĉe sia desegnotabulo. Jam kiel eta infano li komencis konstrui trajnojn.




Vintre la vagonoj troviĝas en la kelo, sed ĉi tiu vagono estis tro granda kaj loĝas en propra domo – kompreneble laŭ la skalo 1:8.



Ankaŭ du vagonoj ŝarĝitaj per karbo travintras en propra domo.



Post la vintro oni devas ĝustigi la turnoŝplaton.



Hans trovis inspiron en Britio.



Ĉiu vagono havas sian personecon.



Alia personeco, kiu travintras en la kelo.



La vandoj en la domo havas multajn memoraĵojn.



Dekoracio.



Iu teknikaĵo, ligita al la trajnoj.



En la laborejo regas ORDO.



En la kelo estas pejzaĝoj kun montoj kaj arboj.



Akvoturo en la fervoja stacio.



Tra densaj arbaroj



....kaj apud rokoj



Trajnoj venas de la supro, de la malsupro kaj malantaŭ min.



Ĉiuj estas fotindaj.



Baze de la flagstango troviĝas la statuo de H.C.Andersen.




La sonoj de la trajnoj similas al tiuj de realaj trajnoj.




Multe da maŝinoj por produkti tiom da objektoj.



La plej nova projekto.



Hans ankaŭ havas multajn librojn pri fervojoj. Jen afiŝo pri angla rapidkonkurso inter du lokomotivoj en 1829.



Koran dankon, pro tre interesa gvidado tra la miniatura lando!



Koran dankon pro tre interesa posttagmezo!



Nepre kunveturu en la eta trajno per la youtube-filmo:

<https://www.youtube.com/watch?v=gDt3mUwHSa4>

"Bergenbanan"




"Bergenbanan" situas en Norvegio kaj estas alte situanta fervojo kiu inaŭguriĝis en la jaro 1909. La fervojo iras inter Hønefoss, norde de Oslo, kaj Bergen. La fervojo estis klasigita kiel la plej bela fervojo en la tuta mondo.

Ĝi iras super la altmontplataĵo Hardangervidda. Tie la plej alta punkto situas 1.237 metroj super la maro, proksime al Finse.

(Legu pli pri tiu fervojo en p. 24.)

Signalsekureco



Hodiaŭ trajnoj neniam kolizias, la trajnveturado estas ĉirkaŭita per tuta pensado pri sendanĝereco. Akcidentoj, kiuj dependas de kaŭzoj kiuj estas antaŭvideblaj, ekzemple ke kondukistoj, trajnekspedistoj aŭ signalteknikistoj hazarde faras eraron, aŭ ke teknika eraro okazas, ne povas okazi. Kondukisto povas malsaniĝi subite, trajnekspedisto povas forgesi malfruiĝintan ŝargvagonaron kiu elakviĝas kaj signalteknikisto povas kupli fadenojn erare inter ĉiuj mil fadenoj.

Ekstere sur la linio oni nur bezonas scii ĉu la fervojo estas libera kaj kion la signaloj pli antaŭe montras. Ĉiu tia informado sendiĝas al la lokomotivo kaj montriĝas al la kondukisto. Se li ne atentigas rapidlimon aŭ eĉ haltsignalon, la lokomotivo bremsas aŭtomate.

Sur manovra nivelo la situacio estas pli komplika. Tie povas esti pliaj trajnmovadoj samtempe kaj ankaŭ bezonatas pli da trajnvojoj kiuj povus trafi en konflikton kun tiuj, kiuj jam estas uzataj. Longtempe jam troviĝis centre metitaj manovrejoj, tiel nomataj trakkomutejoj, de kiuj oni manovris trakforkojn, signalojn kaj barierojn. Kiam trajnvojo estis aranĝita, ĉiuj enmiksitaj objektoj estis riglitaj kaj ne malrigliĝos antaŭ ol la trajno preterpasos.

Ek de la 1970-a jardeko oni uzas komputorizitajn trakkomutejojn. Tiuj kontrolas aŭtomate ĉu ĉiuj kondiĉoj por la trajnvojo estas plenumitaj antaŭ ol iaj komandoj estos senditaj al la enmiksitaj objektoj. Ne estas nur objektoj en la trajnvojo

kiuj koncernas la aŭtomatikon, ankaŭ trakforkoj kaj signaloj en apudaj trakoj foje devas esti ŝanĝitaj por protekti la deziratan trajnvojon. Krom objektoj, kiuj povas esti kontrolitaj kaj legitaj el la trakkomutejo, troviĝas objektoj kiuj informas kie estas la trajnoj aŭ vagonoj sur la trakoj, tiel nomataj trakrelajsoj. Alia tia objekto estas terŝoviĝaverto, kiu raportas ĉu la traktaluso estas firma. Ĉiu informo kiu sendiĝas aŭ riceviĝas ekzistas en du diferencaj eldonoj, ĉiu kun sia propra nombrosistemo kaj traktiĝas per du apartaj programsistemoj, kiuj krome prilaboras siajn datenojn en apartaj vicoj.

Kiam la programsistemoj decidas ĉu la trajnvojo estas ebla, ĉiu aparte dissendas siajn koditajn komandojn al la enmiksitaj objektoj. Nur alveninte, ĉe ĉiu signalo kaj trakforko, la du komandoj kompariĝas. Se ili tiam estas analogaj, la komando efektiviĝas kaj la trajnvojo fiksiĝas. Se ili ne estas logike ekvivalentaj, okazis teknika eraro aŭ en la objekto aŭ en la elektra konduktiloj aŭ en la komputiloj. Se la eraro estas en la komputilo, rezervsistemo transprenas. Tia situacio estas tre nekutima, la "standby"-sistemo, kiu ĉiam estas aktualigita kun ĉiuj kurantaj datenoj, estas plejofte nur uzita je la regula prizorgado de la alia sistemo. Post kelkaj minutoj la trajnoj povas iri denove. Ĉiuj trajnvojoj devas esti aranĝitaj denove kaj la signaloj, kiuj dumtempe montris "haltu", devas ricevi konstantan ripeton de la "veturu"-komando je ia-sekunda intervalo por povi daŭrigi montri "veturu".

La sekureco en ĉiuj staciaj manovrejoj estas prizorgata per ĝia trakkomutejo. Pluraj trakkomutejoj povas esti manovritaj en unu centrala trafikkondukejo, komuna al centoj da stacioj kaj staciaj manovrejoj. Liberaj trajnvojoj por teletrajnoj kompreneble estas certigataj per horaroj en la manovraj sistemoj, sed trajnekspedistoj ankaŭ povas doni antaŭrangon je bezono.

Akcidentoj je trajnoj ne devas okazi nuntempe. Nia sekuresistemo kaj aliaj similaj ekzistas ĉe fervojkompanioj en la tuta mondo, sed ne ĉie. Prefere malfruigi ol akcidento!

Lasse Granat

Danĝera ejo!



En mia infaneco ĉe fervojo "Västgötabanen" multaj incidentoj okazis. Ni loĝis 50 metrojn de transtrakpasejo kaj la infanoj ludis ekstere proksime al la fervojo.

Terura akcidento okazis la unuan de oktobro en la jaro 1959 kiam knaboj ludis sur la trakponto en Lärje. La artikolo rakontas ke la motorvagono tuŝis unu el la junaj knaboj kaj li falis en la rivereto "Lärjeån". Li estis morta kiam ion tiris lin supren.

En Gunnilse knaboj iris per ĉareto sur la reloj, kiam la fervojaj laboristoj ne laboris vespere.

Kiam mi estis tri-jara mi havas infangardanton. Ŝi ne rimarkis ke foje mi iris sur la reloj. Minuton antaŭ ol la trajno al Gotenburgo venis, najbaro kiu estis ekstere, tiris min de la reloj. Mi iris inter la reloj kaj mia intenco estis iri al la stacidometo por renkonti mian patrinon.

Alia danĝero estas vipuroj kiu somere kuŝas sur la varma sablo ĉe la reloj. Atentu! Sed hodiaŭ oni ne permesas nin iri ĉe fervojreloj.

Nun la "Västgötabanen" estas for kaj nur en la memoroj restas.

/Ingegerd

En tiu klaso la infanoj perdis amikon. ↓





Malnova kaj nova libromemoroj



Ekde mia knabineco dum la 1960:a jardeko mi kolektis librojn.

Unu el la plej oldaj nomiĝas "La eta trajno kiu ricevis medalon". Eble estas tio, kio donis al mi la intereson pri trajnoj kaj pri justeco.


La fabelo temas pri la batalo inter la eta, blua trajno kaj la granda, arĝenta kaj rapida trajno "Silverpilen".

Oni ne devas havi malestimon por la plej etaj kaj malfortaj, ĉar oni ne scias kiam oni bezonas helpen de la malfortaj.

Mi memoras kiel mi entuziasmiĝis por la eta blua trajno per laŭtaj demandoj kaj opinioj. Mi volis ĉiam aŭdi la rakonton kaj la tuta familio estis petataj legi la fabelon denove kaj denove, kaj miaj simpatioj ĉiam estis por la malforta kaj blua trajno. *Ingegerd*



Brobyggarna – La pontistoj



Alia libro kiu rakontas pri konstruo de fervojoj estas "Brobyggarna" de Jan Guillou. Li skribas la historion de la tuta 19-a jarcento kaj "Brobyggarna" estas la unua parto pri tri malriĉaj knaboj en Norvegio, kie la fratoj Oskar kaj Lauritz konstruis fervojojn.

Lauritz laboris por Bergensbanan (legu pri ĝi en p. 20) kaj Oskar laboris por fervojkompanio en Afriko.

Mia plej bona konsilo: Legu tiun libron! /Ingegerd

Jan Guillou

Jan Guillou estas ĵurnalisto kaj verkisto kiu naskiĝis la 17-an de januaro en 1944 en Södertälje. Li estis ankaŭ fama koncerne la IB-afero en 1973.

Jan Guillou kaj Peter Bratt malkaŝis la ekziston de sekreta organizo ene de la spiona servo en Svedio.

Li estas ankaŭ la verkisto de la libroj pri kruckavaliristo Arn kaj de la libro pri Carl Hamilton. Tiu libro estas spiona historio. Krome li skribis la libron "Ondskan" (La malbono) pri la vivo en edukpensiono.

Jan Oskar Sverre Lucien Henri Guillou estas granda opinikreanto en Svedio kaj li eldonis grandan kvanton de interesaj libroj.

Legtrezoroj, kaj se vi ne havas konon de liaj libroj kaj se ili estas novaj por vi: Nur komencu legi!

/Ingegerd



Kurso por fervojistoj, trovita de Birgitta Anevik

Jen la unua konkreta rezulto de la starigo de kunlaboro inter IFEF kaj ILEI. La sekva skemo montras unu el centoj da eblaj enhavoj por kurso de Esperanto. La baza didaktika ŝtuparo malantaŭ la kurso estas tiu de la 125-etapa kurso nun evoluigata por la projekto 'esperanto125'. Tiu skemo estas modere modifita, por akomodiĝi al la specifaj bezonoj de la fervoja leksiko kaj temaro. La uzo de tiu skemo garantias, ke la fervoja kurso estas verbo-centra, kaj dekomence emfazas la transitivecon de la verboj, prezentante ilin ĉiam en klara kunteksto.

Komentoj aŭ alternativaj proponoj estas bonvenaj. La ĉefa celgrupo estas profesiaj fervojistoj kiuj iumaniere ricevis iajn informojn pri Esperanto kaj estas konvinkeblaj eklerni la lingvon. La kurso unuavice estu rete ofertata, sed povos poste ricevi presitan liveron. La retkurso devos inkluzivi sonfaciligon, por ke oni klaku frazojn por aŭdi bonan prononcadon, por ke ne necesu tuj fari teoriant prezenton de la tuta son-sistemo. Estante nur cellingva kurso, laŭeble tra bildoj ĝi komuniku kiom eble la

signifojn, kaj precipe en la komenco aldonu humurajn aŭ alikialajn allogajn momentojn. Dulingvaj nacilingvaj versioj estos aldoneblaj laŭlande, sed devos unue ekzisti pure Esperant-lingva versio. La kurso estu bone indeksita, kun apogaj elektronikaj vortaroj. La skemo uzu maksimume ŝablonajn informkolektojn, kiujn rekonos fervojistoj, tiel ke la kompreno de la Esperantaj tekstoj estu facila el la kunteksto.

En la postaj stadioj de la kurso, ni enkondukos uzon de aliaj lingvoj, kun la celo uzi Esperanton por malkaŝi malfacilaĵojn, kiujn reale frontas fervojistoj, kiuj devas komuniki kun sia publiko per diversaj lingvoj. Falsaj amikoj inter lingvoj ofte rezultas en la publika afiŝigo de fremdlingvaj tekstoj, kiuj estas tre mankaj, eraraj, misgvidaj aŭ simple ridigaj. Esperanto provizas ian neŭtralan platformon, per kiu efike malkaŝi kaj klarigi tiujn falsajn amikojn, tiel ke la kurso ne nur instruu Esperanton, sed altigi la konscion de fervojistoj pri aliaj lingvoj kaj la riskoj senintence misuzi ilin.

LA KURSA SUPERRIGARDO

1. Bazaj substantivoj

Litero J. Relo, Rado, Vagono, Pordo, Fenestro, Sidloko, Konduktoro, Lokomotivo, Notlibro, Bileto.

Kun J: Kaj, Fervojo, Kajo, Trajno, Fajfilo, Kajero, Krajono, Jen.

Emfazo sur la antaŭlasta silabo.

Lokomotivo + vagono + vagono + vagono. Jen trajno. Relo kaj rado: jen la bazo de la fervojo.

Jen konduktoro – la trajnestro. Jen bilet-kontrolisto. Sekundo, Minuto, Horo, Tago, Semajno, Monato, Jaro. Horaro.

2. Bazaj adjektivoj

– estas Rapida trajno; komforta sidloko, moderna fervojo, severa kontrolisto, efika konduktoro, pura fenestro, glata relo, ronda rado, forta lokomotivo. sekura sistemo, Malne.

Tiu: Tiu trajno estas rapida (200 km/hore); tiu trajno estas malrapida (200 km/jare).

Tiu sidloko estas komforta, tiu estas nekomforta kaj tiu estas malkomforta. Tiu fenestro estas pura, tiu estas malpura. Tiu signala sistemo estas sekura. Tiu sistemo estas malsekura [amuza bildo]. La bileto-prezo estas alta.



Birgitta Anevik

La prezo estas malalta Ktp.

Tiu relo estas glata (svizzzz!) tiu relo estas malglata (bugadabug-bugadabug...)

Tiu rado estas ne-ronda (bildo: kun plataĵo).

Sono: Gub! Gub! Gub! Gub! Gub! Tiu rado estas mal-ronda (bildo, tre malregula formo)

Sono: Kva – Klunk – Grok – Bli Blug Kaglubo Splam!

Tidelipom'

Tidelipomo kaj tidelipajno

estas amuze iri per trajno.

Tidelipomo kaj tideliponde

radoj kantas kaj turnas ronde.

Tidelipomo kaj tidelipeton

sed oni bezonas propran bileton.

KAJ TIUN HAVAS VI!

Infaneta bileto SJ

Valida por vojaĝo

de **HEJME** al **FORE**

kaj hejmen denove



Res med *Esperanto* i bagaget

– och du hittar vänner att besöka i ca 70 olika länder. Men först måste du lära dig språket. På Facebook kan du också få esperantovänner från hela världen.

Välkommen till en Intensivkurs i esperanto hos Studieförbundet Vuxenskolan, Karl Gustavsg. 15,

GBG (hpl Vasa-Viktorigatan). Tid: må 24 – fr. 28 juni 2019 kl. 10–15. avgift 100:– /dag = 500:–
Studierande betalar 250:–

Arrangörer: Göteborgs Esperantoförening, ILEI (=Esperantolärarnas internationella förbund) och Studieförbundet Vuxenskolan. Förhoppningsvis får vi utländska medhjälpare liksom 2018.

Esperanto är ett smart språk med regelbundet uttal och en grammatik utan undantag. Ta reda på mer genom vår hemsida: www.esperanto-gbg.org. Det finns också gratiskurser på nätet, ex. Lenu.net och Duolingo.com. Bonvenon!

Esperanto-Societo de Gotenburgo

tfn: 0762–654209, e-post: gbg@esperanto.se

Frågor om kursen: Siv Burell 070–721 34 79.

Alexander Keiller

– la fondinta patro de "Götaverken"



Alexander Keiller naskiĝis la 1:an Julio en la jaro 1804 en Dundee kaj mortis la 27:an Marto en la jaro 1874. Li elmirigis al Svedio en la jaro 1825 por labori kun la familiaj aferoj. Tio estis la starto de "Götaverken". Alexander Keiller estas entombigita sur la olda tombejo ĉe "Örgryte" olda preĝejo en la centro de Gotenburgo.

La kolerega Keiller

Estas la dekdua, kaj la preĝokrioj el la nova moskeo ĉe la larĝa piedo de Ramberget aŭdiĝas vaste ĉirkaŭe. Ili eĥas laŭte sub la piedego de Ramberget. La krioj konkuras kun la fortega trafiko, kiu preteriras ĝuste laŭ la monto. La novaj konstruaĵoj de Lindholmen kun metilernejoj kaj sciencaj centroj. La Kanaldomo, kiu elsendas radioprogramojn en Gotenburgo. La vivo ĉirkaŭ Ramberget bruaĉas kaj pulsadas.

Gotenburgo, kiu iam estis la urbo de la grandaj dokejoj. Nun ni ne povas defendi nin,

eĉ se aĉaj malamikoj atakus nin.

Kaj tamen pulsadas ĉi tie vivo, ŝipoj kaj diversaj aktivecoj. En Keiller-parko grakadas la kornikoj malbonaŭgure tiun ĉi aŭtunan tagon fine de oktobro.

"Kia diabla bruo estas tiu? Kiu vekis min? Mia kapo, ho, mia kapo! Se mi kaptus tiun kanajlon! – La kanbastono! Tuj donu al mi la kanbastonon, mi blubatos tiun diablon!"



Estas vekita la kolerika inĝeniero Alexander Keiller, kaj vekis lin la asiduaj preĝoj de la muezino en la novkonstruita moskeo.

– Ja tute maleblas ekhavi sian tagmezan ripozon sen ĝeno, eĉ tie ĉi, ĉe mia propra monto, en mia propra parko. Kaj krome oni detruis mian vivoverkon, Gotenburgan Meĥanikan Metiejon, kiu poste fariĝis Götaverken kaj poste estis malestablita dum la dokeja krizo.


–Sentaŭguloj, moluloj! Miatempe ĉio estis alispeca! Tiam estis ordo, kaj ĉiun, kiu ne obeis, mi trabatis! Tiam oni tuj moderigis sian tonon! Laboristojn oni ne dorlotu permesante al ili sindikatojn kaj tiajn stultaĵojn. Rigardu, kio okazis!

Alexander Keiller, la dudekunujarulo kiu venis al Gotenburgo en la jaro 1825, sidas duonvekiĝinta sopirante "sian riverbordon", kiu fariĝis tia infero pere de ĉiuj produktoj de la inĝenierarto enkondukitaj de li mem (kaj iuj aliaj). Ĉio estis elfarita en la Gotenburga Metiejo: ĉio ekde voflobakiloj, vaporŝipoj el fero kaj plezurboatoj, vapormaŝinoj, vaporkaldronegoj, turbinoj, fervoja materialo, tramoj, pontoj fervojaj kaj ŝoseaj, elektraj portalgruoj, ferlitoj kaj preĝejaj sonoriloj. Ĉio do povis esti realigita en la

Metiejo. – Kaj jen, kio okazis! Lia kapo doloras, li sentas batojn en ĝi, pli fortajn ol se unu lia propra forĝomartelo laborus kun plena forto en ĝi. Kia vekiĝo! Ankoraŭ estis kriate kaj bruegate malsupre de la monto. Eĉ ne unu fojon li aŭdis en la Metiejo bruon kiel ĉi tie.

– Jen rigardu, kiel oni estas etendiĝinta sur tion, kio estis mia. Ankaŭ mia eks-amiko Gibson en Jonsered ne estas tre prosperinta. Nuntempe tie en Jonsered estas sufiĉe dezerte; la tieaj aktivecoj estas fore de la idealoj de Alexander Keiller la patro. Orienta Helpo! Verda Readapto kaj diversaj aliaj suspektaj agadoj. Kaj en la sinjordomo loĝaĉas kelkaj molkoruloj universitataj. Fi!

Estas eknebulinte en Hisingen. Supre ĉe la belvidejo de Ramberget oni povas vidi figuron en kelka distanco. La nebulo ĉirkaŭ li havas verdajn kaj rozajn nuancojn. Mallaŭte oni povas aŭdi kolorajn blasfemojn en la vento. La granda skota, kolerika inĝeniero Alexander Keiller la Maljuna eniras en la eternan nebulon ĉepinte de Ramberget. Nun silentas; nur la malfrua trafiko bruetas pasante la altan monton en la parko, kiu memorigas la farojn de la familio Keiller tie ĉi en Gotenburgo.




Panoramo de "Ramberget" super Gotenburgo.


Esperantolibroj, poseditaj de la estona Anton Reinhold Kapper por la biblioteko de Stannum

Jüri Baumann, nepo de Reinhold Kapper, sendis retroŝton al Inga Johansson, demandante ĉu la Esperanto-Asocio de Gotenburgo volus la esperanto-librojn de lia avo. Inga kaj mi iris al Sävedalen kaj renkontis viron, kiu havis multe por rakonti pri sia avo.

Reinhold Kapper, plej ofte nomata Rein. Li naskiĝis la 11an de aŭgusto en 1890 en Illuka, Virumaa, Estonio, kaj mortis la 5an de januaro en 1973 (82-jara) en Kalmar, kie lia tombo troviĝas.



Anton Reinhold Kapper kun sia edzino.



Anton Reinhold Kapper staras en la mezo, sur la grupfoto.

Jüri Baumann, naskita en 1944, rakontis pri du fuĝoj:

- 1) En 1920 for de la bolŝevistoj – de Leningrad ĝis Estonio.
- 2) En 1945 for de la germanoj – de Estonio al Svedio.


Svedio sendis ŝipojn al Estonio por savi la svedparolantajn "svenskbyborna". Per la naŭa kaj lasta ŝipo Rein Kapper kun sia familio atingis Svedion kaj ekloĝis en Kalmar. Ili ne havis parencojn aŭ alian ligan al Svedio. La avino de Jüri estis dentisto kaj kunportis valizojn kun dentistiloj. Iu forĵetis la ilojn kaj plenigis la valizon per alkoholaĵoj kaj cigaredoj. Tiel ili povis doni subaĉeton al la kontrolistoj. En aliaj valizoj ili havis arĝentan manĝilaron. Granda tapiŝo (6x6 m) kaj kudromaŝino ankaŭ estis en la pakaĵo. Certe ili forlasis Estonion kun malĝojo. Rein havis i.a. ministran postenon, kaj nun li devis komenci novan vivon.

Jam en 1934 Rein estis en Stokholmo por la Universala Kongreso por esperantoparolantoj. Li prelegis kaj lia voĉo troviĝas sur disketo.

En Kalmar Rein gvidis esperanto-kursojn por ABF. Eta Jüri ankaŭ ĉeestis, ĉar ABF postulis ke devas esti almenaŭ 10 partoprenantoj. Li diris sian nomon kaj "Mi estas knabo", kaj poste li rajtis foriri. Rein volis instrui pri negacioj kaj Jüri devis diri: "Mi ne estas knabino", sed li forgesis NE, kaj certe la partoprenantoj ridetis. En lernolibro oni legis frazojn kiel "Kio estas tio?" "Tio estas traktoro." La lingvo uzata inter la gevoj estis la rusa. Ankoraŭ hodiaŭ Jüri povas kompreni la rusan. Hodiaŭ li okupiĝas pri projektoj en Afriko por knabinoj kaj ankaŭ pri skoltoj. Li multe vojaĝas. Tre aktiva persono li estas – bedaŭrinde ne pri esperanto – sed ni kore dankas lin pro liaj informoj pri sia esperantoparolanta avo. /Siv

Artikolo de Rein Kapper en MALGRANDA REVUO 1944

Sten Johansson sendis ĝin al Ora Ĵurnalo. Koran dankon!



<http://www.tekstoĵ.nl/mr/MR444.pdf> sidorna 11–13.

”Memoroj kaj impresoj de estona rifuĝinto”

de Rein Kapper, eksprezidanto de la Estona-Esperanto-Asocio.

Estonio – la plej malgranda ŝtato en la norda Eŭropo. Loĝantaro 1 115 000. Vi svedaj esperantistoj konas ĝin verŝajne, ĉar ni ambaŭ havis ja Esp. Turistajn Komisionon, kiuj aranĝis multajn ekskursojn reciprokajn.

Vi vidis kiel kreskis en Estonio materiala kaj spirita bonstato dank al persista laboro de la estona popolo. La antaŭajn grandbienoĵn, kies posedantoj estis germanaj nobeluloĵ, la estona registraro devige aĉetis de ili, dividis en malgrandajn bienetoĵn, kaj donis al terkulturistoj. Efektivigis la 700-jara revo de

”Minnen och intryck frĵn en estnisk flykting”

av Rein Keppar, f.d. ordförande i Estniska Esperanto-föreningen.

Estland – den minsta staten i norra Europa. Invĵnare: 1 115 000. Ni svenska esperantister kĵnner antagligen till den, för vi hade ju bĵda Esperanto-Turist kommittĵn, som ömsesidigt arrangerade mĵnga utflykter.

Ni sĵg hur det i Estland växte fram materiell och andlig välgång tack vare ett envist arbete av det estniska folket. De tidigare storgodsens, vars ägare var tyska adelsmĵn. tvångsköptes av staten och delades i smĵ gĵrdar, och gavs till lantbrukare. Sĵ uppfylldes esternas 700-

la estonoj! Denove ili havis teron por agrikulturo! Propran teron!

Kaj kia vivo komenciĝis! Elkreskis novaj domoj en kamparo kaj en urboj. Novaj fabrikoj kaj uzinoj, lernejoj kaj teatroj, bibliotekoj kaj societaj domoj. Ekfloris la esperanta movado. Preskaŭ 1.000 samideanoj en la tuta lando. En la Tallina societo "Espero" la biblioteko konsistis el pli ol 1.000 libroj.

En la interno de la tero oni trovis oleo-skiston, kaj el ĝi oni prokuktis oleon, benzinon, asfalton, kaj eksportis ilin en diversajn landojn. La agrikulturo donis superfluan da produktoj. Oni eksportis ankaŭ ilin. Kial do ne vivi! Sed ne!

La jaro 1939. Ekplodis la milito inter la grandŝtatoj. Kaj baldaŭ la militaj ombroj tuŝis ankaŭ la malgrandajn. Sovetunio postulis bazojn por sia armeo. Oni devis doni. La apetito kreskis, kaj en la jaro 1940 Sovetunio uzurpis la tutan landon kaj detruis la sendependan ŝtaton. Venis novaj majstroj el oriento. – El oriento lumo, oni diras! Jes, suna lumo, religia lumo, humeco: Buddha, Jesuo Kristo. Sed – ne tio nun!

Venis homoj, ĝis dentoj armitaj, plimultiĝis, izolaj de aliaj eŭropaj popoloj kun tute alia koncepto pri la vivo.

Kaj oni komencis perforte planti sian kulturon en popolo kun demokrata koncepto. Oni forprenis havaĵojn, ne nur grandajn sed ankaŭ malgrandajn. Oni arestis ne nur plenkreskulojn, sed ankaŭ gejunulojn.

Sed pli terure: el gejunuloj oni organizis grandan reton de spionoj. Oni subpremis la nacian senton, oni malpermesis nacian himnon, nacian flagon, naciajn kantojn. Oni malpermesis semajnajn kaj monatajn esperantlingvajn radiosendojn. Oni fermis esperantosocietojn. La esperanta movado mortis.

ĝriga dröm. Återigen hade de jord för lantbruk! Egen jord!

Och vilket slags liv började! Nya hus växte upp på landsbygden och i städer. Nya fabriker och bruk, skolor och teatrar, bibliotek och föreningshus.

Esperantorörelsen blomstrade. Nästan 1 000 likasinnade i hela landet. I Tallins förening "Espero" (= Hoppet) bestod biblioteket av mer än 1.000 böcker.

I jordens inre fann man oljeskiffer och av den producerade man olja, bensin, asfalt och exporterade till olika länder. Jordbruket gav ett överflöd av produkter. Man exporterar också dem. Varför inte leva livet då! Men nej!

Året var 1939. Kriget exploderade mellan stormakterna. Och snart berörde krigets skuggor också de små. Sovjetunionen fordrade baser för sin armé. Man tvingades ge dem. Aptiten ökade, och år 1940 tillskansade de sig hela landet och förstörde den självständiga staten. Det kom nya härskare österifrån. – Från öster kommer ljuset, säger man. Ja, solljus, religiöst ljus, humanism: Buddha, Jesus Kristus. Men – inte det som kom nu.! Det kom människor, beväpnade till tänderna, som ökade i antal, isolerade från andra europeiska folk och med helt annan livsåskådning. Och man började med våld "plantera" sin kultur i ett folk som hade demokratiska ideal. Man beslagtogs egendom, inte bara stora, utan också små. Man arresterade inte bara vuxna, utan också tonåringar. Men än värre: av tonåringar organiserade man ett stort nätverk av spioner. Man förtryckte nationalkänslan, man förbjöd nationalsången, nationsflaggan, nationella sånger. Man förbjöd vecko- och månatliga radioutsändningar på esperanto. Man stängde esperantoföreningar. Esperantorörelsen dog.

Våldet födde opposition. Då de fruktade arresteringar flydde människor in i skogarna, bytte boplatser, organiserade trupper och

La perforto naskigis opozicion. Timante arestojn homoj forkuris en la arbarojn, ŝanĝis loĝlokojn, organizis taĉmentojn kaj kun armiloj en la manoj defendis siajn vivojn. Kaj nun venis la plej terura, la satana nokto, la 13 – 14 de junio 1941.

En la tuta lando dum tiu nokto oni arestis 14.000 estonojn, tutajn familiojn, disigis edzojn de edzinoj kun infanoj, sidigis ilin en apartajn vagonojn kaj forveturigis ilin. Kien ni ne scias, eĉ ne ĝis nun. Nur deko da leteroj venis poste en Estonion, en kiuj virinoj priskribis, ke ili vivas en neimagebla mizero kaj multaj mortis.

Pri la viroj ni nenion plu aŭdis. Kaj post tio la vagonaroj ĉiunokte veturis orienten. Veturigis senkulpajn homojn al mizero kaj morto. La 22-an de junio 1941. Ekplodis milito inter Germanujo kaj Rusujo. Mobilizo. Denove kelkaj dekmiloj da estonaj viroj estis devige forprenataj de siaj familioj kaj veturigataj orienten en Sibirion, kie oni laborigis ilin en arbarojn. Malvarmaj loĝejoj, malsato, malsanoj, mizero kaj aro da mortintoj. Alproksimiĝis germana armeo al Estonio. Ĉiuj estonj sentis malnovan, centjaran malamon al germanoj. Sed nun tamen, terura afero, ili devas akcepti ilin kiel savantojn! Ĉar ili savis la estonojn de la forpelo al Azio, Siberio.

Okupis nian landon germanoj. Faŝista reĝimo! Laŭnome eĉ socialista. Sed ho ve! Denove arestoj mortigoj. Okazis, ke ili estis preskaŭ same sangruĝaj, nur sub alia nomo. Sed tamen oni povis libere spiri, dormi kaj entute vivi. Oni povis kanti la nacian himnon, havi la nacian flagon.

Sed la ekonomia politiko estis sama: elpreni el Estonio kiel eble plej multe. Ĉion eksporti al Germanujo. Ankaŭ homojn. Ne devige, kompreneble, sed pli ruze, sub la nomo de laboristoj bone pagotaj.

Kvazaŭ Estonio perdis jam preskaŭ 100 000 de sia malgranda loĝantaro, kvankam mankis

med vapen i händerna försvarade de sina liv. Och nu kom det mest förfärliga, den satanistiska natten 13 – 14 juni 1941.

I hela landet denna natt, arresterade man 14.000 ester, hela familjer, man skiljde makar från makor med barn, satte dem i skilda vagnar och förde bort dem. Vart vet vi inte, inte ens nu. Bara ett tiotal brev kom sedan till Estland, i vilka kvinnor beskrev, att de levde i ofattbar misär då många dog. Om männen hörde vi inte någonting längre. Och sedan åkte vagnarna varje natt österut. De förde oskyldiga människor till misär och död.

Det var den 22a juni 1941. Kriget mellan Tyskland och Ryssland exploderade. Mobilisering. På nytt tvingades tiotusentals estniska män bort från sina familjer och fördes österut till Sibirien, där man tvingade dem att arbeta i skogarna. Kalla bostäder, svält, sjukdomar och mängder av döda. Den tyska armén närmade sig Estland. Varje estländare kände ett gammalt, hundraårigt hat mot tyskar. Men nu, hemska situation, måste de acceptera dem som räddare. På så sätt räddade de esterna från att föras bort till Asien, Sibirien. Tyskar ockuperade vårt land. Fascistisk regim! Till namnet t.o.m. socialistisk. Men oh, ve! Återigen arresteringar, dödande. Det hände att de var lika blodröda, bara under ett annat namn. Ändå kunde vi andas fritt, sova och leva fullt ut. Man kunde sjunga nationalsången, ha den nationella flaggan. Men den ekonomiska politiken var densamma: att ta mesta möjliga från Estland. Exportera allt till Tyskland. Också människor. Inte med tvång, naturligtvis, utan listigare, under namnet av bra betalda arbetare.

Trots att Estland förlorade nästan 100 000 av sin lilla befolkning, trots att det saknades arbetskraft i det egna landet, så reste många unga människor p.g.a. propagandapåverkan till Tyskland, för de var också rädda för att ryska kommunister skulle återkomma.

labormanoj en la propra lando, tamen sub la influo de koncerna propagando multaj junaj homoj veturis al Germanujo, ĉar ili timis ankaŭ la revenon de rusaj komunistoj.

Ekvalidis la normigo de manĝoproduktoj. Normigitaj prezoj.

Tuj eksentiĝis manko de varoj, de manĝoproduktoj, ĉar la porcioj estis tro malgrandaj. Komenciĝis spekulacio, ŝtelado. Seniluziiĝo. La tiel nomataj savantoj fariĝis mem rabistoj. Denove deviga mobilizo. Homoj forkuras en arbarojn, eksterlanden.

La 9-an de marto 1944. Rusaj flugiloj super Tallin. Milo da bomboj. Terura nokto, ĉar ĉie brulas! La kvarono de la urbo, domoj, teatroj, malsanulejoj kaj preĝejoj brulas. La homoj forkuras, falas, mortas! Nova mizero. Aŭtuno 1944. Alkproksimiĝas la ruĝa armeo, kuras returne la faŝista. Denove t.n. "savantoj". Arestoj, torturoj, mortigoj, malsato, mizero, forveturigo al Siberio.. Terure! Ne, savu sin, kiu povas! Kien? En Finnlandon, en Svedujon.

La ŝipo alproksimiĝas al Svedujo. Ĉiuj estas ĝojaj, ke neniu torpedo trafis la ŝipon. Jen, la sveda tero, ni staras sur la kajo. Ni estas savitaj. Elektra lumo, ĝentilaj kaj helpemaj oficistoj, buterpanoj kaj lakto, multe da lakto, kion ni urbanoj de agrikultura lando ne havis jam de tri jaroj.

Kaj dormo en sekuro kaj sonĝo en ĉielo! Ĉu povas esti pli feliĉaj homoj ol ni? Estu benata la libera, demokrata Svedlando!

Regler för livsmedelsprodukter började gälla. Reglerade priser. Genast upplevde man brist på livsmedel, för ransonerna var för små. Det började spekuleras och stjälas.

Besvikelse. De s.k. räddarna blev själva plundrare. Återigen påtvingad mobilisering. Människor flyr in i skogar, utomlands.

Det är den 9:e mars 1944. Ryska flygplan över Tallin. Tusentals bomber. En hemsk natt, för allt brinner! En fjärdedel av staden, hus, teatrar, sjukhus och kyrkor brinner. Människor flyr, faller, dör! Ny misär. Det är hösten 1944. Röda armén närmar sig, Den fascistiska retirerar. Återigen s.k. räddare. Arresteringar, tortyr, svält, misär, deportation till Sibirien. Fruktansvärt! Rädda sig, den som kan! Vart? Till Finland, till Sverige.

Fartyget närmar sig Sverige. Alla är glada, att ingen torpedo har träffat båten. Se här är den svenska marken, vi står på kajen. Vi är räddade. Elektriskt ljus, vänliga och hjälpsamma tjänstemän. smörgåsar och mjölk, mycket mjölk, som vi stadsbor i ett jordbruksland alltsedan tre år tillbaka inte har haft. Och en trygg sömn och en himmelsk dröm! Kan det finnas lyckligare människor än vi? Var välsignat, fria demokratiska Sverige!



Propono por post la "breksiĝo"

- Kaj se ni parolus Esperanton?
- Ba! "Esperanto" – negravaĵo! Nerealisma... Utopia!
- Ni okupiĝas pri seriozaj aferoj, NI!

Bildo trovita de Inga Johansson en Twitter.

Att skicka till alla svenska EU-parlamentariker?

– ett PM inspirerat av Lennart Svensson, Lesjöfors.



Språklig demokrati med Esperanto som brospråk i EU

Esperantorörelsen arbetar för språklig demokrati. I EU borde alla språk behandlas lika, men så fungerar det inte. De stora språken har många fördelar, framför de mindre. De forna kolonialländerna vet att språklig makt ger ekonomiska fördelar, därför har de stora europeiska maktspråken spritts över världen.

EU kommer aldrig att få språklig demokrati om man som arbetspråk väljer ett av medlemsländernas språk. Om nu Storbritannien lämnar EU, ska man då välja det nya majoritetsspråket, tyska? Lika illa för demokratin. Det händer att någon föreslår latin som EUs minsta gemensamma nämnare. Knappast ett lättlärt språk. Men – Esperanto är ju det moderna latinet, som fyller alla krav på rättvisa, neutralitet, nyansrikedom, logik och enkelhet och som samtidigt innehåller många internationella ord som EUs medborgare redan kan.

Om EUs medlemsländer satsade på Esperanto, som är planerat för att vara lättlärt, skulle tid och pengar vinnas. Självklart ska alla behålla sina modersmål, men använda Esperanto som brospråk. Esperantorörelsen uppmärksammar alltid Modersmålets dag den 21 februari på olika sätt.

Låt oss hoppas att Ludwig Zamenhof, som i slutet av 1800-talet skapade Esperanto, snart får sin dröm om ett Allas Andra Språk uppfyllt.

Låt oss hoppas att den liberale riksdagsmannen Robert Hannah får sin motion om möjligheten att kunna studera Esperanto på gymnasiet seriöst behandlad, innan den gömts och glömts i Utbildningsutskottets arkiv.

Låt oss alla som en protest mot all ensidig engelskspråkig kultur fordra att Esperanto får en chans... NU!

för Göteborgs Esperantoförening

Siv Burell (siv.burell@gmail.com) Ingegerd Granat, (ingegerd.granat@gmail.com)

Esperanto-Societo de Gotenburgo

tfn: 0762–654209

e-post: gbg@esperanto.se

hemsida: www.esperanto-gbg.org

(Större verkan om SEF och alla föreningar – och kanske också övriga nordiska länder – också ville skriva till sina EU-parlamentariker! Olika formuleringar men samma mål!)